

Johann Wolfgang von Goethe,
Meeres Stille

Johann Wolfgang von
Goethe,
Mara trankvilo

Johann Wolfgang von
Goethe,
Martrankvilo

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

tradukita de Richard Schulz

Tiefe Stille herrscht im Wasser,
Ohne Regung ruht das Meer,
Und bekümmert sieht der Schiffer
Glatte Fläche ringsumher.
Keine Luft von keiner Seite!
Todesstille fürchterlich!
In der ungeheuern Weite
Reget keine Welle sich.

Kalmo regas sur la maro
Kaj senmove kuŝas ĝi.
Zorge vidas la ŝipisto
Glatan facon ĉirkaŭ si.
De nenie blovas vento!
Mort-trankvilo en la rond'!
En enorma la silento
Ne moviĝas iu ond'.

Silentego en la akvo,
Sen ondado nun la mar',
Zorgoplenas la ŝipestro,
Malstreĉitas la velar'.²
Triste staras nun la masto.
Semoveco kun terur'!
En la giganteca vasto
Morta ŝajnas la natur'.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas JOHANN WOLFGANG VON GOE-
THE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-267-537 (2004-09-08 15:24:10)

*Traduko de la Germana poemo
“Meeres Stille” de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22)
en Esperanton de MANFREDO
RATISLAVO (Manfred Retzlaff,
Stettiner Str. 16, D-59302 Oel-
de, Germanio, *1938-11-04)
en 1983-10.11.*

*MR-103-3 / Arg-267-538
(2004-09-08 15:26:09)*

*Traduko de la Germana poemo
“Meeres Stille” de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22)
en Esperanton de RICHARD
SCHULZ (Rikardo Ŝulco,
*1906-07-12 - †1997-09-26)
en 1984.*

*Arg-267-539 (2013-02-26
15:13:25)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis pre-
sita en 1984 en la “Vestfaliaj
Flugfolioj”, kiun eldonis la ko-
nata Esperanto-poeto Rikardo
Ŝulco (Richard Schulz), kiam
li loĝis en la germana urbo
Mindeno (Minden). La kva-
ran kaj kvinan liniojn de la
poemo mi, Manfred Retzlaff,
provis en 2004-09-08 pliboni-
gi; ĉar Rikardo Ŝulco erare ne-
glektis, ke post la vorto “vidas”
oni devus uzi la akuzativan
formon “velaron”. Pri Richard
Schulz vidu la vikipedian rete-
jon [http://de.wikipedia.
org/wiki/Richard_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

²Rikardo Ŝulco skribis erare:
Zorgoplene la ŝipestro
Vidas pendu la velar'. (Mankas tie la akuzativo.)